**Mortis Tiŝ‘, la ora fiŝ‘** Kiun aĝon povas atingi orfiŝo?

En la aĝo de 43 jaroj mortis Tiŝ‘ en la urbeto *Thirks*, norda Anglujo. Tiŝ‘ estis la plej aĝa orfiŝo de la mondo, kaj *Hilda Hand* (72) konis ĝin tiom bone kiom neniu alia: „Dum tiuj multaj jaroj ni tre alproksimiĝis unu al la alia, kaj mi precize sciis, ĉu ĝi estas feliĉa aŭ ne. Grandan bruon ekzemple ĝi tute ne ŝatis“. Novan orfiŝon ŝi ne plu volas: „Neniu povas anstataŭi Tiŝon!“ Laŭ s-rino *Hand* la sekreto de longa (orfiŝ)vivo estas: ne tro da nutraĵo kaj ombra lok(et)o. Tiŝ‘ (ĝia anglalingva nomo skribiĝas „*Tish*“) estis enterigita de sia amikino en la antaŭdoma ĝardeno, tute sekrete, en ujo jogurta. (2004-10-01)

**Sekagorĝe** Kial nervozeco kaŭzas sekan buŝon?

Ne senkaŭze oratoro preskaŭ ĉiam havas antaŭ si, surkatedre, glason da akvo. Ĉar lia streĉeco kaj nervozeco tre ofte esprimiĝas per seka gorĝo. La kaŭzo por tiu ĉi fenomeno estas fiziologiaj reagoj, kiuj jam de pratempoj helpis superi kaj mastri danĝerajn situaciojn: „Forkuri aŭ batali“ laŭtas tiu natura kaj denaska impulso, dum kiu la centralo bremsas aŭ eĉ malfunkciigas negravajn korpajn funkciojn. Dum tio aktiviĝas nervoj, kiuj unuflanke ebligas impetan koncentriĝan agon (ekz. vastiĝo de sangovazoj kondukantaj al muskolaro kaj koro) kaj aliflanke reduktiĝas aliaj korpofunkcioj (ekz. la digestofunkcioj, al kiuj apartenas ankaŭ la salivproduktado). Nu, vere ja ekzistas – kiam je la kontraŭa flanko troviĝas leono aŭ granda aŭskultantaro – pli gravaj aferoj por fari ol digestado… (2004-09-24)

**Pri saŭroj ĉiam io nova** Kial formortis la saŭroj?

La plej novan teorion responde al nia ŝatokupa demando „Kial do formortis la saŭroj?“ liveras *Bruce Runnegar* kaj kolegoj de la Losanĝelesa universitato, Usono. Ili komputile simulis la moviĝan fluon (dum la pasintaj centmilionoj da jaroj) de la planedoj* kaj ties periodaj ŝanĝiĝoj. Tiuj studoj rezultigis, ke antaŭ 65 milionoj da jaroj la planeda sistemo evidente „disiĝis el la juntoj“: la vojŝanĝiĝoj de la internaj planedoj Merkuro, Venuso, Tero kaj Marso subite pligrandiĝis. Tiaj ĥaosaj moviĝoj, laŭ *Runnegar*, forĵetis asteroidojn el ilia origina vojo kaj cirkuligis ilin terdirekten. La polvo, kiu estiĝis post kiam la asteroidoj trafis la Teron, kaŭzis severajn klimatajn ŝanĝojn – kaj finon al la saŭroj. Do, ĝis novaj prisaŭraj informoj sekvontjare… (2004-10-11)

* resp., senhomonimfobie, “planetoj” (vd. alineon 2 en paĝo 87 de tiu ĉi SR-kajero)


# Scienca Revuo Vol. 56 (2005)(2) / n-ro 201

*Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)*

Hejmpaĝo: http://www.eventoj.hu/isae/

**Pres-indikaĵoj** : ISSN 0048-9557. Eldonanto: ISAE
Laserkopiita : Aprilo 2005 ĉe *Copy & Co, Eschwege*/Germanio
Responsa redakta teamo : La estraro de ISAE


**Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare**
pagebla al
a) **landa peranto** (resp. landa delegito), aŭ al
b) ISAE-konto **ĉe UEA**/*Rotterdam* (NL): **isae-z** *) *vd. sube*, aŭ al
c) Poŝtbanka konto **n-ro 140380-608 nome de ISAE-SACHS** *) *vd. sube* ĉe *Postbank Frankfurt/Main*, Germanio, Banka kodo 500 100 60

IBAN: DE76 5001 0060 0140 3806 08
BIC: PBNKDEFF

**Landaj Perantoj de ISAE**


| | | |
|---|---|---|
| Aŭstralio | *Libroservo AEA*<br>*143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.* | *<Libroservo@ans.com.au>* |
| Brazilo | *Brazila Esperanto-Ligo (BEL)*<br>*C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasília* | *<bel@esperanto.org.br>* |
| Britio | *S-ro Paul Hewitt*<br>*26, Highfield Rd., North Thoresby*<br>*Grimsby, N.E. Links, GB – DN36 5RT* | *<paul@esperanto.freeserve.do.uk>* |
| Finnlando | *S-ino Heta Kesälä*<br>*Kalamihenkuya 3 D 32, FI-4300 Tuusula* | *<heta.kesala@pp.inet.fi>* |
| Francio | *S-ro Charles Trébouet*<br>*Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil* | *<trebouet.bohere@compagnet.fr>* |
| Irlando | *S-ino Joy Davies*<br>*9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W* | *<noviresp@eircom.net>* |
| Korea Resp. | *S-ro Cho Sung Ho*<br>*Biol.Fak.Inha Univ., KR Inchon 402-751* | *<shcho@inha.ac.kr>* |
| Norvegio | *Eldonejo Esperanto*<br>*Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo* | *<hara-ryg@online.no>* |
| Pollando | *S-ino Maria Majerczak*<br>*ul. Armii Krajowej 7 m 122, PL - 30 150 Kraków* | *<mamajer@interia.pl>* |
| Svedio | *S-ino Lisbeth Andreasson*<br>*Södra Rörum pl. 455, SE 24294 Hörby* | *<bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>* |
| Usono | *Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA)*<br>*P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA* | *<elna@esperanto-us.org>* |


***) Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b) aŭ c) (kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu sendota Scienca Revuo) la eldonanton:**
***Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio***
***Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>***